



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 7
1970

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
36-a (41-a) jaro
Monata

Por partoprenado en la kongreso anoncis sin nur 19 norvegaj samideanoj, sed bedaŭrinde 5 el ili poste devis rezigni pro neatenditaj malfacilaĵoj. Do restus 14 partoprenantoj, sed 2 el ili ne estas observitaj de la aliaj 12, do eble ili tute ne ĉeestis kaj la vera nombro

Pri la 55a Universala Kongreso en Vieno

de norvegoj estas nur 12. La tuta kongreso konsistis de preskaŭ 2000 homoj el 44 landoj.

Kelkaj norvegoj partoprenis la bone aranĝitan skandinavian kongresvojaĝon, kiu ekiris de Kopenhago, aliaj vojaĝis laŭ pli persone elektitaj vojoj. Kun ĝojo ni forlasis la pluvplenan kaj malvarman propran landon por renkonti someran varmon en meza Eŭropo. Kaj vere, ni renkontis la varmon, efektive pli grandan varmon ol ni facile kaj plezure kapablas ĝui. — Strange estis ke kiam ni per la flugmaŝino malleviĝis teren ekster Vieno, ni tute ne povis ekvidi la

urbon de la aero. Tamen, alvenintaj en ĝi, ni preskaŭ ne plu povis vidi ion alian. Kia granda urbo kaj kiaj distancoj inter la hotelo kaj la kongresejo kaj al aliaj lokoj kie aferoj okazis! Ni sentis nin komence sufiĉe perditaj kaj devis ĉiutage rezervi multe da tempo nur por veturado en la urbo. Feliĉe oni povis uzi taksion je sufiĉe moderaj prezoj, kaj tio savis tempon kaj fortojn.

En Norvegujo ni havas la esprimon «uta blank, men inni krank». Pri la kongresejo «Sofiensåle» oni povas diri kontraŭe «uta krank, men inni blank», ĉar ĝi estas kutima, anonime aspekta murdomo en malantaŭa strato. Malmulto fanfaronis pri Esperanto-kongreso krom sola verdstela flago. Interne estis koridoroj kaj vestejoj utiligitaj por la diversaj ĝiĉetoj kaj servoj. En la fondo troviĝis tamen ŝtuparoj supren, kiuj per ruĝaj tapiŝoj malkaŝis kio atendas nin: belegaj salonegoj kun marmoro, kolonoj, kristalaj lampoj, belaj malnovstilaj murpaperoj kaj brilaj pargetplankoj faritaj por dancado. La plej granda sa-

lono estis ankaŭ ĉirkaŭata en du etaĝoj de etaj romantikaj fenestro-niĉoj kie oni povis pli kviete sidi por ripozi en ruĝa veluro.

Ĉi-tie okazis la interkonatiĝa vespero, la aŭstra kultura vespero, la junulara vespero, la oficiala balo kaj la internacia arta vespero. Certe estas ke tiaj belaj ĉirkaŭaĵoj multe kontribuis al la sukceso kaj al la ĉiam bona etoso kune kun la valoraj programoj prezentitaj.

Bedaŭrinde la salonoj pli malbone taŭgis por aŭskultado de prelegoj kaj diskutoj. La akustiko estis tiam malfacila problemo, kaj ne ĉiuj uzis mikrofonon.

Tiel granda parto de la publiko perdis la enhavon de la temoj pritraktataj. Kontentige estas tial legi ke la 56a kongreso en Londono okazos en universitata kolegio kie tiaj problemoj espereble ne ripetigos.

La du plej grandaj aranĝoj okazis aliloke, nome la inaŭguro de la kongreso en la grandega urba halo «Stadthalle» kaj la oficiala akcepto de la urbestro de Vieno en la urbodomo. La inaŭguro estis solena ceremonio kies plej altaj punktoj estis la paroladoj de la du prezidantoj: D-ro Franz Jonas de la Respubliko Aŭstrujo kaj d-ro Ivo Lapenna de Universala Esperanta Asocio. Ni ĉiuj scias ke d-ro Lapenna modele majstras Esperanton, sed la parolado de Franz Jonas rikoltis ankoraŭ pli fortan aplaŭdon en admiro kaj dankemo pro la fakto ke li estas la unua statprezidanto en la historio kiu malfermis universalan Esper-

anto-kongreson kaj eĉ faris tion kiel aktiva Esperantisto. Inter la multaj reprezentantoj por aliaj registaroj estis ankaŭ kelkaj kiuj salutis en Esperanto, kaj ricevis speciale fortan aplaŭdon. Unu reprezentanto por mezeŭropa lando tamen nek salutis en propra lingvo nek en Esperanto, kaj li rikoltis mokajn kaj ĉagrenajn alvokojn miksitaĵojn kun la deca aplaŭdo.

Parto de la aranĝo dissendiĝis vespere de Aŭstra Radio kaj Televido.

Kiu povos iam forgesi la oficialan akcepton ĉe la urbestro? Kia aranĝo! Kia festo! Kia gaja kaj korvarma internacia, pacama etoso! Nur kelkaj ŝlosilvortoj: Pompa salonego kun kolonaj vicoj, ornamenta da ĉiuspecaj landaj flagoj, ree kristalo, marmoro kaj oro ĉie. 2000 homoj kune ĉe tabletoj: Vino, refreŝiga trinkado, longegaj bufedoj kun abundaj delikataĵoj por

(Daŭr. p. 88)

ARHUS

La internaciaj feriaj aŭtunaj Esperantokursoj okazos 18.—24. de oktobro en la alternejo JUNAJ HEJMOJ (tute moderna) en Århus, Danlando. Venu por ĝui belan feriosemaĵon en vere Esperanta rondo kaj en regiono kun plej multekoloraj arbaroj apud blua maro. Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

La ĝusta sinteno

Leginte en ĉi tiu numero de nia gazeto la raporton pri la U.K. en Vieno, vi havas ideon pri la ĝusta sinteno. Oni ne humile adoru aŭ entuziasme ĝojkriu pri ĉio, kio havas la verdon stelon. Oni ne kritiku ĉiam laboron faritan de aliaj esperantistoj. Oni memoru la bonajn kaj pozitivajn flankojn. Oni konsideru, ke multaj homoj kun amo kaj sindonemo oferis monon, tempon, forton kaj komforton, por ke la rezulto estu kiel eble plej bona.

Kun tia sinteno, kun respekto kaj kun sana kritiko, oni verŝajne akiros pli da rezultoj. La entuziasma adorado estas negativa trajto, se ne kombinita kun ofervolo kaj serioza intereso.

Ni ripetu: serioza intereso.

*

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. En Junio superan ekzamenon en Bergen sukcese plenumis Doris Birkelund, Åshild Birkenes, elementan ekzamenon en Oslo sukcese plenumis John Kvalvåg.

Ordinaraĵ aŭtunaj ekzamenoj. Ekzamenoj ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1970. Instruistano ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj ricevblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1-a de Novembro. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenu po 2 — du skemojn. *Plenu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtgiro-konto 100.34.

Ekzercaj taskoj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Stop-Bowitz prezidanto.

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna laboro. La Liga Estraro insiste admonas ĉiujn klubojn kaj membrojn nun fari eksterordinarajn klopodojn por progresigi Esperanton en sia loko. Absolute ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nun starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesigantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso; provu igi iun gazeton en via loko publikigi nian gazetan kurson. Vidu ankaŭ la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por kluboj. — *Oktobro:* La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu invitilon al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la Tago de U.N.O. — La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizojn kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

La 56a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Londono, Anglujo, somere 1971. Detaloj sekvos.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Oni okazigis unu estrarkunvenon kaj elsendis 2 cirkulerojn: unu al la kluboj kaj unu al la junulaj membroj. Oni nomis Kirsten Ek nova komisiito pri radio kaj Elna Matland nova gvidanto de la gazetaro servo. Oni decidis studi la demandon pri aparta kotizo por pensiitoj. Oni nomis Thure Resberg reprezentanto de N.E.L. al la Inaŭguro de la 55 a Universala Kongreso en Vieno, kaj proponis R. Bugge-Paulsen kiel reprezentanton de la Norvega Registaro. Oni decidis esplori la eblecojn por okazigi la 42an Norvegan Esperanto-Kongreson en 1971 en Norda Norvegujo.

La Liga Estraro.

John Berggreen nova prezidanto de S.E.L.

La Centro Komitato de Skolta Esperantista Ligo post la forpaso 2/1-70 de Douglas Murphy elektis sinjoron John BERGGREEN, Oslo, Norvegujo, nova prezidanto por S.E.L. ekde 1-a de julio 1970.

John Berggreen naskiĝis 25/10-09 en Sandefjord, Norvegujo. Li fariĝis skolto en 1921 kaj dum 20 jaroj ĝis 1941 li trapasis ĉiujn rangojn de patrolestro — trupestro — grupestro — Gilwellano — «rover»-gvidanto.

Li lernis Esperanton en 1932 kaj poste restis fidela al Esp.

*

EL LA SALUTO DE LA NOVA PREZIDANTO

Nia Ligo portempe estas malgranda laŭ membronombro, sed ne malforta ĉar ni reprezentas treege gravan organizaĵon: La Esperantomovado bezonas novajn adeptojn — ĉefe inter la junularo — por renovigi sin kaj kreski, kaj la skoltoj — pli ol 20 milionoj el pli ol 100 landoj — nepre bezonas internacian neŭtralan lingvon. *Do la du movadoj devas kunlabori en maniero multe pli intima ol ĝis nun!* Mi forte ŝatas substreki ĉi-tiun gravan taskon.

John Berggreen.

Venecia poŝtmarko?

La Urso, Sarpsborg, proponis al la Norvega Poŝto, ke ĝi eldonu specialan poŝtmarkon kun bildo el la droniĝanta urbo Venecio. Tiu eksterordinara urbo apartenas ne nur al Italujo, sed al la tuta mondo. Se oni eldonus en ĉiuj landoj similajn poŝtmarkojn kun eta kromsumo por la savo de Venecio, tio povus grave kontribui al la la-

borego por konservi la kanalan urbon.

La Poŝta Direktoro respondis al la klubo en Sarpsborg, ke oni serioze pritraktis la proponon, sed en la baldaŭa estonteco estos tiom da memorindaj naciaj okazaĵoj, tiel ke la Norvega Poŝto ne povas rekomendi eldonon de tia poŝtmarko.

Nun la problemo devas esti pritraktata sur pli alta ŝtupo, t.e. ke la propono devas iri al internacia poŝtaŭtoritato. La esperantistoj tiel montros sian intereson pri internacia kulturo.

PETU BELAJN PROSPEKTOJN!

Nordorient-Svislando kaj la urbo St. Gallen, bela feriolando kaj ties kultura centro, eldonis prospektojn kun Esperanto enmetfolio. Petu ilin — Esperantlingve! — ĉe Nordostschweiz. Verkehrsvereinigung, CH-9001 St. Gallen.

Ekzamenoj

Elementa ekzameno en majo 1970. Diktaĵo.

*La flegistino bezonis/
la flartabakon (1)*

En *parola* (2) maljunulejo / estis malsanulo, / kiu de tempo al tempo / ricevis donace / skatolon de flartabako / de amikoj vizitantaj. / Sed la flegistino / havis ordonon (3) / de la kuracisto, / ke ŝi forprenu la flartabakon / de la maljunulo, / tuj kiam la vizita tempo finiĝis. / Ĉar tiu ĉi paciento / estis

Studento de sociologio k. psikologio dez. interŝ. notojn pri tiuj k. interrilataj temoj. 28-jara, Bahano, mondfederalisto, senpartia. Dag Stacey Westgaard, Box 96 Station A, Prince George BC, KANADO.

tro malsana / por uzi flartabakon,
/ estis ankoraŭ pli necese / for-
preni ĝin. / Li ankaŭ terure / mal-
purigus la plankon. / Sed kiam ŝi
forprenis / de li la sepan skatolon /
dum du semajnoj, / la maljunulo
subite / koleriĝis kaj kriis: / «Ne,
nu estas sufiĉe. / Nun la flegistino
/ devas komenci aĉeti / flarta-
bakon per propra mono!»

- 1) flartabako = snus
- 2) paroŝo = prestegjeld
- 3) ordono = ordre

Elementa ekzameno en majo 1970

Tradukaĵo.

En smakebit. (1)

Et skip kom en dag til *stranda*
(2) av en kanibal-øy. Da kom en
hvit mann *padlende* (3) til skipet
og spurte: «Har dere tobakk om-
bord?»

«Ja», var svaret. «Men hvem
er du, og hvordan har du reddet
livet ditt blant alle disse kani-
balene?»

«Jeg heter Andersen», sa han,
«og jeg *fløt* (4) i land på stranda
her for femten år siden. Jeg liker
trebeinet mitt godt, for når de
svarte begynner å varme opp den
store *gryta* (5), går jeg bare til
høvdingen og trekker opp bukse.
Så tar jeg kniven min og skjærer
en *flis* (6) av trebeinet og gir ham
en bit å smake på.

- 1) smak = gusto,
smake (på) = gustimi
- 2) strand = bordo
- 3) padleåre = pagajo,
padle = pagaji

- 4) flyte = flosi
- 5) gryte = bolpoto
- 6) flis = splito

Supera ekzameno en majo—junio
1970.

Tradukaĵo.

En smart kontorist.

Parker & Jones, et stort og mek-
tig Londoner-firma skulle en gang
undertegne en viktig kontrakt med
det mektige firma Koopmann i
Amsterdam. For at alt skulle ord-
nes mest mulig *fordelaktig*, (1)
sendte det først nevnte firma en
ung kontorist, en meget *gløgg* (2)
mann, til Amsterdam. Kontoristen
ble meget godt mottatt og gjorde
et så godt inntrykk på direktør
Koopmann at han inviterte den
unge mannen hjem til aftens. Kon-
toristen ble forelsket i husets unge
datter, og hun *gjengjeldte* (3) hans
følelser. Da kontoristen den føl-
gende dag skulle avslutte handelen,
benyttet han anledningen til å
anholde (4) om datterens hånd.
Den rike kjøpmannen syntes like-
vel ikke at den fattige kontoristen
var et passende parti og nektet
sitt samtykke. Men da utbrøt kon-
toristen: «Men hvis jeg blir kom-
panjong (= medeier) i firmaet
Parker & Jones, kan jeg da bli
Deres svigersønn?» Den mektige
handelsmannen lente seg tilbake i
lenestolen, lekte med sitt tykke
gullkjede og svarte smilende:
«Hvis De kan bli kompanjong i
firmaet Parker & Jones, kan De
også bli min svigersønn.» Den
unge mannen grep sin hatt, for

avgårde til telegrafstasjonen og
sendte følgende telegram til sitt
firma: «Kan Koopmanns sviger-
sønn bli kompanjong i Parker &
Jones?» Svaret innløp snart: «Ja.»
En time senere var den fattige
kontoristen Koopmanns sviger-
sønn og kompanjong i sitt eget
firma.

- 1) fordel = avantaĝo
- 2) gløgg = sagaca
- 3) gjengjeldte: gjensidig =
reciproka
- 4) anholde = peti

Poŝtmarkoj-mono-premioj

Jam sukceso

Kvankam ne tre multaj sendis
poŝtmarkojn al la redakcio laŭ
nia peto, la ricevitaĵo kvantoj
tamen estas sufiĉe valoraj por kovri
gravan parton de la elspezoj de nia
gazeto. Ĉiuj sendintoj meritas dan-
kon. Precipe valoraj estis la sen-
daĵoj de s-ro Rudolf Dreyer, kaj
la kontribuoj de la kluboj en
Bodø, Haugesund kaj Sarpsborg.
Eĉ el Polujo venis kontribuo!
Kompreneble ni daŭre akceptas
novajn sendaĵojn.

Revendado

Ni ne intencis revendi la pm al
niaj legantoj, sed tamen etskale
revendis laŭ niaj informoj. Pluraj
legantoj mendis niajn kovertetojn,
kelkaj renovigis siajn mendojn.
Ankaŭ tio havigas monon en la
kaso. Kompreneble tiu rivendado
postulas multe da laboro kaj sam-
tempe ankaŭ forrabas por afranko

parton de la gajnita mono. Kom-
prenante tion, kelkaj mendantoj
aldonis afrankon — dankon! Oni
daŭre povas mendi niajn sendaĵojn
— po kr. 4,- aŭ kr. 6,-. Ĉiujn pag-
ojn bv. sendi per neuzitaj norvegaj
poŝtmarkoj — rekte al la redak-
cio en Sarpsborg (tio por eviti
kromlaboron por la koncernaj per-
sonoj ĉe la liga oficejo en Oslo.

Novaj vojoj

Malgraŭ la kromlaboro tempor-
aba ni decidis — almenaŭ provi-
zore — provi novajn vojojn. For-
vendinte la plej valorajn pm, ni ja
havas stokon da ordinaraj pm —
kiuj tamen povus esti interesaj por
knabetoj el nia konataro. Ni metis
dudekon da tiaj pm en saketojn,
kiujn ni vendos por po 2 kronoj
(tiom ili efektive ne valoras!) Tam-
men en kelkajn, relative multajn,
saketojn bonaj poŝtmarkoj estas
aldonitaj. En kelkaj el tiuj saketoj
aldone troviĝas granda pm (dif-
ekta), sur kies dorsflanko estas
skribita, ke oni ĝin sendu kaj ke
oni interŝanĝe ricevos premion. Do
tiuj saketoj da pm ne estas alia ol
ordinaraj loteriaj biletoj, aŭ pli
ĝuste neordinaraj. La pm vi for-
donu al infanoj, se vi ne mem po-
vas uzi ilin.

En unu el la kovertoj troviĝas
granda poŝtmarko kun bildo de
rozo. Kiu trovas ĝin, ricevos por
ĝi la libron DISKO.

Ankaŭ en la ordinaraj kovertoj
nun troviĝos de tempo al tempo
informo pri premio. Kaj tiu pre-
mio konsistos el pluraj poŝtmarkoj.
La ideo kompreneble estas, ke niaj

legantoj estu logataj al aĉetado — t.e. al ekonomia subtenado de Norvega Esperantisto.

Propono ricevita

Unu el niaj legantoj kolektas norvegajn kaj svedajn kaj danajn poŝtmarkojn, sur kiuj estas klare legeblaj la lokaj nomoj. Tio kompreneble povas esti tre interesa kolektado, preĉipe, se oni aranĝas la kolekton laŭ poŝtnumeroj. Nia leganto proponas, ke Norvega Esperantisto en sia «poŝtmarka servo» vendu ankaŭ tiajn poŝtmarkojn. Nu, tio estas tre temporaba afero. Tamen ni elserĉis stokejon, kaj ilin vendas por 5

(De p. 82)

Pri la 55a Universala

manĝi. Bonveniga parolado kaj dankparolo sekvitaj de muziko komenciĝanta per la Danuba valso, — dancado kaj kantado en brila humoro kaj tropika varmo. Fine la konata melodio «Gis revido» («Auf Wiedersehen») kaj finfine la melodio de amikeco («For auld long syne») ĉiuj man-en-mane.

Duonan horon poste devis komenciĝi la teatra prezentado! Ĝi estas, laŭ la oficiala kritikisto «Verŝajne la sola kongresa aranĝo, kiu komenciĝis precize je la definitiva horo», sed mi emas aldoni! «kiu devus esti prokrastita minimume duonan horon», ĉar estis *neeble* por centoj da homoj atingi la teatron tiel malproksiman de la urbo-domo dum la duona horo kiu estis je dispono laŭ la oficiala pro-

kronoj por 20 pm. Nia leganto proponas, ke la norvegaj Esperanto-kluboĵ faru konkurson inter si, kiu klubo povos kolekti la plej grandan kvanton de diversaj loknomoj sur pm, kaj ke Norvega Esperantisto publikigu la liston en ĉiu numero — li opinias, ke tio eble povos krei pli da kontakto inter la norvegaj kluboj. Li ankaŭ proponas, ke oni kolektu kiel eble multajn diversajn pm stampitajn en sia hejmurbo. Ni jen prezentis al vi ideojn — nia espero estas, ke ili monigos poŝtmarkojn por nia gazeto.

JHR.

gramo. Tiuj, kiuj hazarde sukcesis havigi al si taksion kaj alvenis ĝustatempe, havis multe da brua disturbo de alvenantaj homoj dum la monologo de la «Sybilla», kiu meritis plenan atenton. Poste bulgarioj ludis gajan popolkomedion «La Virina Regno».

Tiuj, kiuj ne estis en la teatro tiun vesperon, havis okazon en la kongresejo vidi lumbildojn kaj filmojn, inter aliajn la koloran reklamfilmon de Norvegaj Ŝtataj Fervojoj, «Ni estis tie». Bedaŭrinde nia filmo montriĝis sufiĉe malfrue en la programo kaj la publiko estis laca post la granda festo, sed la filmo rikoltis fortan aplaudon de la malmultaj restintaj personoj. Kaj niaj norvegaj observintoj aldonas ankaŭ ke la filmo vere estas belega kaj admirinda.

La tagoj estis plenplenaj de programoj, kaj la partoprenantoj

havis multajn travivaĵojn kiujn estas neeble menciigi unuopaj: Ekskursoj en kaj ekster Vieno, vizitoj al muzeoj, parkoj, butikoj, ktp. Ĉiuj provis almeti en la programon kelkajn personajn dezirojn por la Viena restado. Parolu kun la partoprenintoj mem: Vi povos aŭdi pri variaj temoj: vizito al la monto Rax, al katedraloj kaj katakomboj, al drinkejoj en Grinzing kaj striptizejo kun la konata Lehara nomo «Maxim». Nun, eble vi ne aŭdos pri ĉio, kelkaj havas eble sekretojn por konservi —?

Multe oni lernis, multe oni spertis, pri la akiroj kaj problemoj de nia movado, pri Vieno, pri Aŭstrujo, pri novaj esperanto-geamikoj.

Ĉu ni faris spertojn kiuj povas esti utilaj por nova kongreso? Jes, ke oni neniam povas tro bone prepari sian vojaĝon hejme studante mapojn, programojn kaj informilojn. Estas tro malfrue legi nokte dum la kongresa semajno. Cetere ke oni devus alveni unu semajnon antaŭ la komenco de la kongreso aŭ almenaŭ kelkajn tagojn antaŭe por ripozi post la vojaĝo, por ekoni la novan lokon kaj kutimiĝi al la praktikaj rilatoj kiel mono, poŝto, tramvojoj, kaj multe pli.

Pripensinde por kongresaranĝantoj:

Ĝiĉetoj devas esti malfermitaj la tutaj tagojn se nur praktike eble. Bonvolu memori ke homoj, kiuj uzas limigitan liberton kaj multe da mono por vojaĝi al kongreso en malproksima lando, ne volas pasigi sian tempon atendante longvice antaŭ ĝiĉetoj kun

malrapida ekspedo! Ke oni eĉ tutefermis la poŝtĝiĉeton dum du tagoj, estis problema afero por tre multaj kongresanoj, kaj tio ne devas ripetiĝi!

Por personoj kiuj ŝatas bone plani siajn tagojn kaj elekteme mendi siajn ekskursojn, tio estas neebla kiam, kiel ĉi-jare, la dua bulteno donas limdatojn por la mendo de ekskursoj, antaŭ ol oni estas ricevinta la kongresan libron kun la tagaj programoj. Tiam oni ne povas antaŭvidi ĉu ekskurso okazos samtempe kun interesa kaj preferata programo.

Denove estis ankaŭ sperteble ke *la kongresa libro havas malkonvenan formaton.* Oni bezonas ĝin ja ĉiutage kaj devas portadi ĝin kun si ĉiam kaj ĉie. Sed ĝi estas tro granda por meti en viran poŝon aŭ en virinan mansaketon. *La solvo estas presi la kongreslibron en la sama formato kiel la UEA-jarlibro.*

La Gazetara Servo estas tre grava informa organo. Ĝiaj ĉiutagaj bultenoj estas tre interesa legado por aktivaj esperantistoj. Sed la dissendado de ili ŝajnas tro limigita por plene utiligi la grandan propagandan valoron de la enhavo. Se ne estas ebleco multobligi la bultenojn al pli granda nombro por interesigantoj, bonvolu trovi solvon ke estu eble aboni ilin aŭ aĉeti specimenojn (en kongresa librovendejo ekz.). Tio donus okazon al fervoraj esperantistoj ekster la decidita aro studi temojn, traduki interesajn punktojn al sia nacia lingvo por apliki

en koncerna hejma klubo (ekz. aŭtomobilista) aŭ por publiki ĝi resumojn en *hejmlandaj gazetoj*. Multaj interesigantoj povas fari ion baze de la bultenoj pli ol *limigita* homonombro, ĉu ne? Jes, oni ne povas tro emfazi la informan valoron de la bultenoj. Tial publikigu ilin pli vaste! Kaj uzu la intereson montritan pri la enhavo kiel instigilon por ankoraŭ pli detale kaj zorgeme referi en ili kaj redakti ilin!

En ĉi-tiu referaĵo mi nur povas redoni kelkajn el la multaj ideoj kaj pensoj kiujn oni ricevas kaj ekhavas dum tia kongrestravivado. Ĝi estis pli inspira kaj riĉa ol estas eble priskribi.

Kiam d-ro Grimme, la prezi-

Pri lando-nomoj, nova solvo

Ĉu oni fine nun transiris al nova notacio pri la geografiaj nomoj? La sttistiko pri la 55a U.K. en Vieno almenaŭ indikas tion aŭ ĉu la redaktoro de N.E. havis atakon pro la eksterordinare tropika varmego? Longtempe mi rompis mian cerbon por diveni la ĝustajn nomojn, ĝis mi trovis ke la nomoj estas la la «Naciaj markoj por motorveturiloj» en la Sepa Senso! Do plena rebuso eble amuza por poliglota aŭtomobilistoj kiel diverkonkurso. Mi admonas al vi provi vian kapablon aŭ nekapablon (Vidu pĝ 69 en Norvega Esperantisto nr. 5/6).

Unue kelkaj rimarkoj pri la listo. La mallongigoj estas kelkfoje

danto de La Loka Kongresa Komitato, salutis la kongreson, li substreki ke ĝi en longa streĉa laboro faris ĉion eblan por sukcesigi la kongreson, kaj li petis la ĉeestantojn pardoni pro eventualaj mankoj kaj memori nur agrablajn aferojn.

Tion ni plezure faras. Kaj ni asertas ke por ĉio, kio pasis sukcese, ni ĝojis kun vi. En tio, kio okazis neatendite ekster la bonaj intencoj, ni tamen ĉiam sentis la bedaŭron, la helpemon kaj la prizorgon de niaj aŭstraj samideanoj. Do, *la memoroj kiuj restas, estas la valoraj, la plezuraj, la ĝojigaj, la instigaj.*

NI ELKORE DANKAS!

Annalise Torgnes.

eraraj. Ekz. D. Germanio kaj D. Danlando, kio devas esti DK. Danmark. Kelkaj nomoj estas skribitaj en Esperanto ordinara, kvankam ekzistas veturilaj markoj ankaŭ por ili. Jen ili estas:

DZ. Alĝerio, RA (Respubliko Argentina), GH. Ghana, RI Resp. Indonezia, CGO. Congo Kinshasa, RCB. Resp. Congo Brazzaville, KOREO (tiun ĉi formon mi absolute preferas antaŭ Koreujo, Koreio), PE. Peruo, ZA. (Zeud Afrika) Sudafriko, UAR. Unuiĝinta Araba Resp. ET. Egiptio, U. Uruguaĵo.

Cetere estas: AUS. Aŭstralio, A. Aŭstrio, B. Belgio, BR. Brazilo, GB. Granda Britio, BG. Bulgario, CS. Ĉekoslovakio, SF. Suomio Finnlando, F. Francio, GR. Greklando, E. España Hispanio, HK. Hongkong, H. Hungario, IL. Is-

raelo, I. Italio, J. Japanio, YU. Jugoslavio, CDN. Kanado (Kial ne CND?), N. Norvegio, NL. Nederlando, Ng. (ĉu Nigerio aŭ Nigero?), PL. Pollando, P. Portugalio, R. Rumanio, S. Svedio, CH. Helvetia, Svislando.

La plej multaj kongresanoj venas el Fo. Post tio rangas Gobo kaj Doko, kiuj ne estu interŝanĝita kun Do. La Noloj ankaŭ abundas. La Nooj malmultas (ne interŝanĝu kun la Noo-dancistoj, pli kun la danco en la halo de la Dovre-gubo, «la gubo en la skatollo») El So kaj Ro kaj Po ankaŭ venos kelkaj.

Nun fine la pluvo venis, do bonan resanon! Fartu!

HF.

POUL THORSEN:

Karakterizo

Se mi ne eraras, li suverene staras supere al la resto rilate al modesto.

Favora profesio

La dana klimato banalas. Laŭ la optimistoj ĝi nur idealas por la kuracistoj.

Verdismo

Inter la ardaĵ deziroj de niaj pra-pra-pioniroj estis certe pisi verde.

Esperanto

Baraktas la infano, do ŝajne estas viva; rezistas al malsano reala aŭ fiktiva, forruktas la marasmo de l'ita-ata-spasmo.

Kruda konstato

La libro plej vaste konata ne estas Biblio Vulgata, sed laŭ apriora impresio: la libro pri — forgeso.

Incito

Dimanĉe mi fru-ellitigās — necesas ja tre akurati, ke plene la tempo sufiĉas por pene nenionfaradi!

Cies batalo —

Kutime batalo-refleksoj ekĉesas kiam mallumas, sed luktoj inter la seksoj nur tiam plie ekumas.

RECENZOJ

Johan Hammond Rosbach: Disko. Eld.: Dansk Esperanto-Forlag. Åbyhøj 1970. 109 p., 15 x 21 cm, broŝ. Prezo ne indikita.

Denove Rosbach prezentas por ni bonegan novelaron, kiu estas lia kvara. La unua estis «Bagatelo» (1951), kiu ne estis baga-

telaro. Lia dua estis «Homoj kaj Riveroj» (1957). Tiam sekvis «La mirinda eleksiro» (1968) kaj jam nun la novelaro «Disko», per kiu Rosbach atingis la plej altan ŝtupon de sia ĝisnuna evoluo kiel novelisto.

Ĉi tiu nivelaro diferencigas sin de liaj tri unuaj per du manieroj. Unue, la novelojn kunligas temfaden. Ili ĉiuj pli malpli rilatas al homoj, kiuj iel estis kunligitaj al la malnova vaporŝipo «Disko», kiu iam regule trafikis inter Danujo kaj Gronlando. Ĉi tiun ŝipon urbestro de sudfranca urbeto intencis aĉeti por starigi sur la sudfrancan marbordon kiel hotelon kun nokta restoracio.

Due, la diversaj rakontoj de la novelaro estas reciproke kunligitaj tiamaniere, ke unu rakonto nature kondukas al la alia. Ofte la posta novelo donas novan, eĉ surprizan, perspektivon al la antaŭa. Cetere, tio ne estas tute nova formo ĉe Rosbach. Oni trovis similon jam en lia novelaro «Homoj kaj Riveroj» inter la du noveloj «Bravulino» kaj «Bildo rompiĝis». Tial «Disko» fakte pli similus novelan romanon ol novelaron. Konforme al tio Rosbach mem nomas la rakontojn «Ciklo da skizoj» en la subtitolo de la libro.

«Disko» enhavas dudekon da skizoj, kies situacioj rapide ŝanĝiĝas, jen ni legas pri orgenludanta stratulino, jen pri bibliotekanta pastro, jen pri simio sur preĝeja turo, jen pri orfiŝoj en akvario, jen pri araneoj, jen pri infuzorioj, jen pri

unuokula kolonelo, jen pri monŝtelanta bankkasisto, sed ĉiam pri personoj aŭ situacioj, kiuj plene kaptas niajn interesojn kaj atenton.

Enkonduke William Auld donas valoran superrigardon super la verkaro de Rosbach asertante, ke Rosbach estas «natura rakontisto de historioj», kiu eĉ memorigas lin pri Somerset Maugham!

La lingvo ĉiam estas en bonaj manoj ĉe Rosbach, krome ĝi ankaŭ estas kontrolita de la Literatura Komitato se SAT. Sed tamen kelkaj rimarkoj: anst. «infanveturilo» (60) mi preferus «infanĉareto»; anst. «rigardi samen» (60) mi preferus «rigardi samdirekten», anst. «ĝazbando» (67) mi preferus «ĵazbando»; anst. «krimromano» (105) mi preferus «kriminalromano».

Kiel ĉiam Rosbach montras tre rafinitan uzon de verboj, ekz. «akri» (40), «riveri» (60), «steli» (69), «moti» (105) kaj «najtingali» (106). Estis cetere interese rimarki, ke Rosbach en «Disko» ne plu uzis sian ŝatatan esprimon «mal-tro». Anstataŭe li en jena novelaro lanĉas alian «mal»-vorton, nome «iru malĉielen» (80)!

Neologismojn Rosbach uzas nur malmulte. En la fino de la libro li en glosaro listigis tiujn vortojn, kiujn oni ne trovas en Plena Vortaro kaj ties Suplemento. Tamen pluraj vortoj mankas en tiu glosaro, nome «kriokonito» (25), «glaciologo» (25), «platformo» (40), «romia» (71), «unikorno» (90), «kleptomano» (94) kaj aliaj. Kiel piednotojn oni cetere trovas

plurajn klarigojn al la teksto, sed nepre necese estus, ke Rosbach pli precize klarigus la vorton «kriokonito», kiun ni facile miskonprenus pro ĝia ŝajna simileco al la vortoj «krio» kaj «koni». «Kriokonito» (glacipolvo) estas speco de minerala polvo, kiun oni povas trovi sur la enlanda glaciejo de Gronlando.

Koncerne preserarojn mi trovis 16, sed ili neniel ĝenas la legadon, cble nur «febluo» (9) anst. «feblulo». Cetere mi rimarkis iom kontraŭgramatikan uzon de la dividstrekto, ekz. «ĉifoje» (29, 55, 93) anst. «ĉi-foje»; «tiu-ĉi» kaj «tion-ĉi» (56) anst. «tiu ĉi» kaj «tion ĉi»; kaj fine «pli-malpli» (74, 89) anst. «pli malpli».

Bonega papero, bonega preso kaj vere bona kovrilpaĝo plivalorigas la grandan novelaron, kiu nepre ne manku en la biblioteko de ĉiuj amantoj de bonega Esperanta literaturo!

Lars Kåre Hunnes

Norvega Kroniko

Oslo

20/4.70. La prez. Annalise Torgnes deziris koran bonvenon al la ĉeestantoj, kaj donis la parolon al C. Støp-Bowitz, kiu diris memoriĝajn vortojn okaze de la forpaso de Linnea kaj Ernfrid Malmgren, kiuj ambaŭ mortis la 28-an de marto 1970. S-ro Malmgren dediĉis sian tutan vivon al Esperanto.

C. Støp-Bowitz petis la ĉeestan-

tojn honori la memoron de gesinjoroj Malmgren per mallonga silento.

Otto Prytz informis ke Orienta Distrikto de NEL okazigos ĝeneralan kunsidon la 6.-7/6.70.

Randolf Grotmål hodiaŭ kiel «Vortoj por pripenso» legis poemon de J. H. Errko «Amu la patrian lingvon».


La ĉefpunkto de la programo estis rakonto de Eva kaj Carl Støp-Bowitz pri la laboro pri «Plena Ilustrita Vortaro». C. Støp-Bowitz komencis menciante la plej konatajn similspecajn vortarojn — anglan, francan, germanan kaj norvegan. Ankaŭ la esperantistoj sentis la bezonon de plena vortaro, kaj eldoniĝis la vortaro de Kabe, en kiu ĉiu vorto estis klarigita kaj definita en la sama lingvo. SAT eldonis Plenan Vortaron en 1930, sed la unua kaj dua eldonoj rapide elĉerpiĝis. Oni trovis ke estas necese revizii la Plenan Vortaron de SAT, kaj post la dua mondmilito oni komencis la laboron pri nova eldono. C. Støp-Bowitz kunlaboris pri zoologio. Ĉirkaŭ 1949 la materialo estis preta, sed mankis mono por la eldono. UEA opiniis ke la Espromovado nepre bezonas la novan plenan vortaron, kaj proponis kunlaboron. La rezulto estis ke oni povis antaŭmendi kaj pagi la vortaron je favora prezo, kaj tiel kolektiĝis la necesa kapitalo. SAT promesis ke la Plena Ilustrita Vor-

(Daŭr. p. 95)

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



Travivaĵoj dum vojaĝo al Rimini

La 8-an de majo 1970 mi ekvojaĝis al la 22a IFEF kongreso en Rimini. Sed antaŭ tiu evento mi estis stipendiata en Germanio, dank al Norvega Fervoja Sindikato.

Post interesa vojaĝo dum kiu mi ĝuis la belan naturon en suda Germanio mi matene la 10-an de majo venis al Garmisch-Partenkirchen. Tie atendis min mia bona amiko lok.estro Alfred Gissibl, inter kolegoj nomita Fred., ĉe kiu mi restis 3 tagojn kaj akompanis lin en la lokomotivo dum lia deĵoro.

Post kora akceptado de lia familio ni tagmeze 10.5. veturigis trajnon al Reutte in Tirol en Aŭstrio.

Garmisch-Partenkirchen estas malgranda urbo kun bela ĉirkaŭaĵo kaj ĉirkaŭita de altaj montoj, situanta je la renkontpunkto de 3 valoj. Ĝi estas fama vintransporto — loko kaj grava nodpunkto por la fervojtrafiko kun linioj al Munkeno, Innsbruck kaj Reutte in Tirol. «Alvenas samtempe de Innsbruck trajno kun aŭstraj lok. kaj lok.personaro kaj de Reutte in Tirol trajno kun germana lok. kaj lok.personaro kaj pro tio ĉiam okazas lok.ŝanĝado tie», klarigis Fred.

Ni grimpis en la lok.por ekveturi la 45 km. longan distancon. Mi rimarkis ke Fred. unue kontrolis registradstrion kiu koncernas la iradon de la lok. kaj ke li sur ĝi markis kie lia deĵoro komenciĝis.

Same li faris kiam ni finis la vojaĝon en Reutte in Tirol.

En Deutsche Bundesbahn nur estas unu deĵoranto en la elektraj kaj dizelaj lok. kaj ili ne estas ekipitaj per flankenspegulo. Tial la lok.estro devas observi malantaŭen kiam doniĝas ekvetursignalo. Fred. diris ke tio estas, kvankam tio ŝajnas esti malpraktika, absolute plej sekura. Li klarigis ke en Germanio, koncerne trajnkrucigado kaŭze de malfruiĝo, la trajnekspedistoj de la stacioj mem decidis pri tio, sen konferenci kun trajntrafikgvidanto. Plue la lok.estro ne ricevas sciigon pri trajnkrucigado, sed nur veturas laŭ la signaloj. Li montris al mi aŭtomatan trajnbremsekipaĵon kiun la lok.estro devas, por ke ĝi funkcii, tuŝi piede aŭ mane ĉi minute. Se ne, la trajno haltas. Ĉi tiu geniala sistemo eviteblas ke okazas akcidentoj pro homa eraro.

Kelkfoje dum nia interparolado, kiu okazis esperante, ni uzis niajn fakvortarojn kiuj eldoniĝis germana-esperanta/esperanta-germana kaj norvega-esperanta/esperanta-norvega.

La linio iris tra regionoj kun grandioza naturo, laŭ la deklivo de la 2962 metraj alta Zugspitze. Ni pretarpasis la limstacion Griesen kaj venis al Reutte in Tirol kie ni haltis 3 horojn ĝis ni reenveturigis la trajnon.

(Daŭrigota)

(De p. 93)

Norvega....

taro kuŝos sur la tablo dum la kongreso en Wien.

Eva Støp-Bowitz rakontis pri sia laboro pri la ilustraĵoj. Antaŭ 15 jaroj SAT demandis ŝin ĉu ŝi evt. volus desegni la ilustraĵojn, kaj ŝi konsentis. Do, Eva desegnis kaj Carl kunlaboris. Ambaŭ ankaŭ vojaĝis al Paris por diskuti detalojn. Estis treege malfacila laboro trovi bonajn modelojn, sed finfine la materialo kaj ilustraĵoj estis pretaj. Lan kunlaboro kun SAT estis bonega kaj la komitatanoj estis treege simpatiaj. Eva rakontis ke ankaŭ la filo Einar faris 6 el la platoj pri motoroj k.s.

La prez. dankis pro la tre interesa prelego.

Sub la devizo «La membroj rakontas» Annalise Torgnes legis dum la kafopaŭzo eltiraĵon el letero kiun ŝi ricevis de angla korespondanto pri kofro-etikedoj — blankaj/verdaj kun la nomo ESPERANTO kiel propagando por la internacia lingvo. H.D.

Løten

La 7-an de Majo la geanoj de La Norda Stelo en Hamar denove havis la ĝojon viziti la klubon en Løten. Ĉi tiun fojon sinjoro Krogstie montris al ni du filmojn. Unue ni vidis la belan kaj amuzan filmon pri Oslo kun la nomo «Oslo, la ĉefurbo de la vikingoj». Ĝin faris Oslo og omegns trafikklag. Poste ni estis flatitaj esti la unuaj Esperantistoj kiuj havis la plezuron vidi la novan filmon «Mi

estis tie». Tiun filmon faris Norges Statsbaner. La teksto estis tradukita Esperanten de s.ro Krogstie kaj voĉlegita de s.ro C. Støp-Bowitz. Kune kun la turisto en la filmo ni vojaĝis en la plej belaj, vidindaj lokoj de nia lando, lokoj kiujn ni ĉiuj ekdeziris viziti. Same certe okazos al homoj en Germanujo kaj Italujo kie s.ro Krogstie estis montranta la filmon.

Ekino.

Haugesund

MARA VENTO jarkunvenis en la kutima ejo la 5/2 sub gvido de la vicprez. Erling Vorland. Specialan bonvenigon li direktis al la programulino de la kunveno, la japana s-ano Tamiko Kauakami. Sekvis jar-raporto kaj jar-bilanco kiuj ambaŭ aprobiĝis sen rimarkigoj.

La elektoj rezultis jene: Klara Dahl, prez., Erling Vorland, vicprez., O. J. Rønnevig, sekr. Steffen Kjetland, kasisto, kaj O. Thormodsen, estrarano, ĉiuj reelektitaj. Anstataŭantoj: Solveig Mathiesen, Johs. Sortland. Studgvidantino: Jarmila Šestakova (nova) Propagand- kaj inform-komitato: Sigv. S. Ege, Arne Gram, A. J. Smedsvik.

Tamiko Kauakami prezentis tre instruajn kaj intereskaptajn programojn pri siaj lando kaj popolo, moroj kaj vivmanero. Ŝi rikoltis fortan aplaudon kaj post la prezento respondis al multe da demandoj kiujn la klubanoj direktis al ŝi.

Ref.

struisto en registara departemento,
60 jara, dez. kor. kun norvegoj.

*

S-ro Stanislav Czesnowicz —
Postf. 13, GDYNIA, Polujo, dez.
kor. kun Skandinavio.

*

Libuše Hájková, Valaŝka Bys-
trice 316, OKRES VSETIN —
Ĉeĥoslovakio, 23-jara instruistino
pri gimnastiko, des. kor. Interesoj:
bildkartoĵ, sporto, literaturo, mu-
ziko.

*

Hungara knabino 13-jara dezi-
ras korespondi. Ŝatas klasikan kaj
beat-muzikon. Kolektas bildkar-
toĵojn. Valéria Zoltán, Orbánhegyi
út. 12, BUDAPEST XII, Hung-
arujo.

Trondheim

Grupo Esperantista de Trond-
hejmo aranĝis dum la unua kvar-
onjaro 3 ordinarajn kunvenojn kaj
3 studkunvenojn. La jarkunveno
estis ĉe ges-roj Utne, kie oni elek-
tis jenan estraron por 1970:

Prezidanto: Lars Kåre Hunnes
(reel.). Vicprezidanto: Nils Utne
(nova). Sekretario: Anna Kolstø
(nova). Kasisto: Kristian Fleischer
(reel.).

Ĉe ges-roj Nordstrand okazis
kunveno 17.2., kie japanino mont-
ris lumbildojn kaj interese parolis
pri sia lando. Ŝi ankaŭ prezentis
al ni japanajn manĝaĵojn kaj ton-
dis tipe japanajn, artistajn paper-
modelojn.

S-ro Nordstrand estis nomita
honora membro de Grupo Espe-
rantista de Trondhejmo, kaj rice-
vis belegan diplomon.

La 31an de marto oni kunvenis
ĉe ges-roj Hunnes, kaj Hunnes
parolis pri la kalendaro — tre in-
strue kaj interese.

Ĉeestantoj estas ordinare 14—16.

Dum la studrondoj ni tradukas
diversajn norvegajn noveletojn en
Esperanton.

Anna Kolstø, sekretario.

Korespondu!

S-ro W. Simpson, 30 Beverly
Hill Street, Annerly, BRISBANE,
Queensland, Aŭstralio, domkon-

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Telefono: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1.

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar